



La 10-a
INTERNACIA FOIRO
EN BRNO
de la 8-a - 17-a de septembro 1968

ĈEĤOSLOVAKIO







unu
el la plej gravaj
kaj plej bone
organizitaj
foiroj

montrado
de la plej novaj
masinkonstruaj
produktoj
de la mondproduktado

rica
sciencteknika
programo



Septembro 1968: B R N O – centro de mondkomerco

Ĉiujare septembre okazas en Brno foiro de maŝinkonstrua industrio, kiun partoprenas industrie evoluintaj landoj de la tuta mondo. Tiel ĝi fariĝas montrado de maŝinkonstruaj produktoj de monda nivelo. La foiro en Brno enviciĝis inter la ĉefajn ekspoziciojn de maŝinkonstruado en Eŭropo kaj ankaŭ en la mondkalendaro de foiroj ĝi akiris eminentan lokon, malgraŭ ke ĝi nunjare solenas nur etan jubileon — 10 jarojn. Ĝian sukceson garantias unuflanke alta nivelo de la ekspoziciataj produktoj, aliflanke ĝia rigora laŭfaka aranĝo.

La unua jardeko de foiroj en Brno

En septembro 1968 oni inaŭguros la dekan fojon la Internacian Foiron en Brno. La dek jaroj ne estas tiom multe, sed ĝi estas okazo por revizii. Ĝi estis periodo de fruktodona komparado de la sciencteknika progreso de nia lando kun industria evoluo en la ceteraj landoj. Ĝi estis ankaŭ periodo de intensa penado pri evoluado de internacia kunlaboro en ekonomia sfero.

Nuntempe neniu scias imagi ekonomie altnivelan ŝtaton sen aplikado de la plej novaj teknikaj scioj. Por Ĉeĥoslovakio, lando kun alte evoluinta manufaktura industrio, ĝi validas duoble.

En ekonomia kresko de la lando ludas la eksterlanda komerco gravan rolon kaj la foiroj do havas por la aranĝanta lando ĉefe eksport-signifon. Sed Brno estas loko, kie oni kontraktas komercojn ankaŭ inter la aliaj landoj — ĉar ĝuste en tio bazigas ĝia internacieco. En la jaro 1967 pli ol 65 % da tuta ekspozicia areo estis okupita de eksterlandaj ekspoziciantoj. En Brnon alveturas ĉiujare novaj interesitoj, kun kiuj oni ligas novajn komercajn kontaktojn. Tio ankaŭ signifas partoprenon de la foiro je ampleksigo de la internacia komerco.

La foiro estas ĉiujare aranĝata kiel montrado de progresanta teknika nivelo kaj sortimento de maŝinkonstrua produktado en la partoprenantaj landoj. Ĝia konsekvenca maŝinkonstrua specialigo rezultas el la ĝenerala situacio de ĉi tiu branĉo en la tuta ĉeĥoslovaka ekonomio. Maŝinkonstrua karaktero de la foiro ankaŭ harmonias kun evoluo de la ceteraj mondfoiroj kaj ekspozicioj.

40 Jaroj de Brna ekspoziciejo

Brno — urbo kun pramalnova komerca tradicio sur vojkruciĝo de la mezepokaj komercaj vojoj, klopodis jam je la fino de la pasinta jarcento pri konstruo de daŭra ekspoziciejo. Sed ĉi tiu penado efektiviĝis nur post la jaro 1918, post estiĝo de la memstara ĉeĥoslovaka ŝtato. De la jaro 1922 oni komencis aranĝadi ĉiujare ekspoziciajn foirojn, komence en diversaj lernej-konstruaĵoj de la interna urbo kaj sub libera ĉielo en parko Lužánky. Nur por la unua granda tutŝtata ekspozicio, aranĝita al la deka jubileo de la nova libera ŝtato, oni komencis konstruadon de la nova ekspoziciejo, kiu fariĝis bazo por la nuntempa ekspoziciejo. Ekspozicio de Nuntempa Kulturo, la unua pli granda entrepreno, okazis de majo ĝis septembro en la jaro 1928. Sur 26 hektaroj estis

konstruitaj 65 grandaj kaj malpli grandaj pavilonoj kun suma tegmentita areo de 20.000 m². Ĝis la jaro 1938 estis aranĝite sur ĉi tiu ekspoziciejo 40 plej diversaj ekspozicioj. Dum la milita tempo la ekspoziciejo estis forlasita. Nur en la jaro 1949 oni komencis ĝin renovigi. En jaroj 1955, 1956 kaj 1957 okazis tie sukcesaj Ekspozicioj de Ĉeĥoslovaka Industrio Maŝinkonstrua kaj de la jaro 1959 ĉiujare estas aranĝata Internacia Foiro, specialigata je maŝinkonstruaj produktoj. La tuta areo de la ekspozicia parko en Brno mezuras 750.000 m², el tio 74.000 m² estas tegmentita ekspozicia areo kaj 65.000 m² estas libera ekspozicia areo.

Posedanto de la ekspoziciejo en Brno estas entrepreno de la eksterlanda komerco Foiroj kaj Ekspozicioj de Brno, kiu luigas la ekspoziciejon al diversaj internaciaj kaj enlandaj okazoj. Laŭ peto ĝi sekurigas al la ekspoziciantoj ĉiajn servojn: ellaboras semaron, arkitekturajn projektojn, sekurigas muntadon kaj malmuntadon de ekspozicioj. Ĝi liveras al ekspoziciantoj laŭ ilia deziro ekspoziciojn perfekte pretajn. Al eksterlandaj ekspoziciantoj ĝi prizorgas interpretistojn kaj aliajn kunlaborantojn.

Sur la ekspoziciejo estas tutjare lokita filio de doganoficejo, dum la foiro troviĝas tie vojaĝ-agentejo ČEDOK kaj oficejo de Čs. Aerolinioj.

Sur la ekspoziciejo de Brno estas aranĝataj regule la jenaj entreprenoj:

majo: Foiro de Čs. Konsumvaro

junio: ekspozicioj PRAGOEXPO, VELOEXPO, MERKURIA SHOW

junio: kinekologia ekspozicio

septembro: INTERNACIA FOIRO (Industrio de maŝinkonstruado)

oktobro: INTECO (ĉiun duan jaron)

novembro: FILMFORUMO — Internacia Film-FOIRO

Dum la tuta jaro estas aranĝataj sur la ekspoziciejo en la kongresa halo, aŭ en kinosalono, ekipitaj pere de interpret-aparatoj, internaciaj simpozioj, kongresoj kaj diversaj fakulaj renkontiĝoj.

Bona okazo por la komercado kaj kunlaboro en la produktado alkondukas en Brnon ciam pli grandan nombron da interesatoj

Grandan influon je intereso de eksterlando pri la foiro certe havas avantaĝa situo de Ĉeĥoslovakio en koro de Eŭropo kaj la foira devizo: Teknikon en servojn de la paco kaj progreso. Sed intereso pri partopreno en la foiro ĉefe kreskas tial, ĉar Brno disponigas eminentajn okazojn por la komerca traktado, eventuale por la kunlaboro en la produktado. En la jaro 1959, en la unua Internacia Foiro de Brno ekspoziciis 432 firmoj kaj entreprenoj. Nombro de ekspoziciantoj kreskis en la jaro 1960 je 492, en la jaro 1961 je 537, en la jaro 1962 je 585, en la jaro 1963 je 618, en la jaro 1964 je 708, en la jaro 1965 da ekspoziciantoj estis jam duoble pli ol en la jaro 1959, en la jaro 1966 da ili estis 995 kaj en la jaro 1967 jam 1178.

Krom la ĉeĥoslovakaj entreprenoj daŭraj ekspoziciantoj en ĉiuj naŭ foiroj estis firmoj el la jenaj 18 lan-







doj: el Belgio, Bulgario, Danlando, Francio, Nederlando, Italio, Japanio, Hungario, GDR, Pollando, GFR, Liĥtenstejno, Aŭstrio, USSR, Svedlando, Svislando, Granda Britio kaj Okcidenta Berlino.
Escepte de unujara interrompo partoprenis ok foirojn Finnlando, Jugoslavio, Norvegio kaj Rumanio. Krom la nomitaj landoj al la daŭraj ekspoziciantoj aliĝas per sia ĉiujara partopreno en Pavilono de Nacioj Brazilo, Kubo, Libano kaj Turkio.

Ĉeĥoslovakaj produktoj en la foiro

La plej granda ekspozicianto en la foiro de Brno estas, memkompreneble, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, lando de altevoluinta maŝinkonstrua industrio. Giaj produktoj estos prezentataj en ĉiuj fakgrupoj, cititaj en la nomenklaturo de la foiro. Ĉeĥoslovakio ekspozicios parte en sia oficiala ekspozicio en la Rotondo de pavilono A, parte ĝi estos reprezentita en fakgrupoj en unuopaj ekspozicioj de entreprenoj por eksterlanda komerco STROJIMPORT, STROJEXPORT, ŠKODAEXPORT, KOVO, MOTOKOV, OMNIPOL, POLYTECHNA, FERROMET, METALIMEX, SKLOEXPORT, CHEMAPOL, INVESTA, MERKURIA kaj ARTIA. Vizitantoj de la foiro vidos aron da produktoj de la maŝinkonstrua industrio de ĉs. deveno el uzinoj de ŠKODA, ČKD, CHEPOS, VÍTKOVICKÉ ŽELEZÁRNY, ktp. ktp.
En la jaro 1967 estis decidite ekspozicii en la Rotondo nur ĉeĥoslovakajn produktojn apartenantaj al la progresiva kaj interes-grupo, havantaj eminentajn kvalitojn kaj estantaj por la produktado kaj eksporto en difinita jaro la plej konvenaj. Ĉar en ĉeĥoslovaka eksporto okupas il-maŝinoj gravan lokon, ili okupas ankaŭ elstaran lokon inter ĉeĥoslovakaj produktoj. Do en la jaro 1967 estis ekspoziciataj en la Rotondo numere direktataj il-maŝinoj. En la jaro 1968 estos ekspoziciataj la plej bonaj ĉeĥoslovakaj teksmaŝinoj. La Rotondo tiel fariĝas inda inaŭgur-halo.

Brno – skolo de tekniko

En la Internacia Foiro de Brno ĉiujare viciĝas apud si produktoj de maŝinkonstrua industrio el la plej diversaj landoj de l' mondo kaj la foiro donas la plej bonajn kondiĉojn por la komerca enterprenado. Krome ĉiujare kunvenas ĉi tie ankaŭ aro da teknikaj fakuloj kaj sciencaj laborantoj por partopreni la riĉan sciencteknikan programon.
La nunjara foiro komencos sian sciencteknikan programon jam kelkajn tagojn antaŭ sia inaŭguro per la Sepa Internacia Redaktora Konferenco de Teknika Preso. Post ĝi dum tempo de la foiro okazos diversaj simpozioj, faktagoj, preskonferencoj, prelegoj de ekstarlandaj ekspoziciantoj, vizito de uzinoj, trarigardo de ekspozicioj kaj prelegoj en konsultcentroj. Altan nivelon de la sciencteknikaj simpozioj pruvas ankaŭ partopreno de prelegantoj el eksterlando. En la jaro 1968 okazos la jenaj simpozioj:

- Unucelaj maŝinoj kaj aŭtomataj produktlinioj
- Uzo de komput-tekniko en la trajn-trafiko
- Aŭtomatigo kaj kemiigo en la led-industrio

(Ĉiuj simpozioj estos ekster Brno.)
Ĉs. Sciencteknika Societo kune kun Domo de Tekniko en Brno aranĝos faktagojn.

Industriaj faktagoj:

- Instalajoj por mekanikigo de industrio de nutrajoj
- Mekanikigo kaj aŭtomatigo de internaj muntadlaboroj
- Transportiloj de urba amas-trafiko
- Mekanikigo de ŝarĝ-laboroj

Agrokulturaj faktagoj:

- Teknikaj instalajoj por prilaboro de furaĝrestoj
- Informado pri agrokulturaj maŝinoj
- Pliintensigo de miksil-produktado
- Mekanikigo de riparlaboroj ĉe dren-instalajoj
- Terposedaj reguligoj kaj kampvojoj



Eldonas Foiroj kaj Ekspozicioj de Brno, Ĉeĥoslovakio.
Informservo: Hlinky 104, Brno, tel. Brno 311/2390.
Presis: Grafia 04, Brno, Gottwaldova 21